

# ĈEA-Retkomunikoj 2013/03



ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

- [1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO](#)
- [2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO](#)
- [3. ALIĜPERIODO POR ĈEA-KONFERENCO EN NYMBURK \(25.-28.10.\) ESTAS LA 15-A DE SEPTEMBRO!](#)
- [4. JUBILEA SOLENAĴO EN SVITAVY \(27.-29.9.\) - NE MALTRAFU ALIĜPERIODON \(31.8\)!](#)
- [5. 7-A POSTFERIA RENKONTIĜO EN SUDA BOHEMIO](#)
- [6. SKOLTA SOLENAĴO EN KOPŘIVNICE \(12.-13.9.\)](#)
- [7. DU AŬTUNAJ ARANĜOJ POR VIA LINGVA PERFEKTIĜO!](#)
- [8. VORTOJ DE LA ĈEFDELEGITO](#)
- [9. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ](#)
- [10. PLUJAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY](#)
- [11. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS](#)
- [12. LISTO DE ARANĜOJ](#)

## **1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO**

Jen la tria numero de ĈEA-Retkomunikoj en la jaro 2013. Someraj ferioj jam preskaŭ ĉe fino, ankaŭ varma somera vetero plej verŝajne ne plu revenos... kaj tio signifas, ke baldaŭ estos aŭtuno. Kaj kun aŭtuno ankaŭ konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en urbo Nymburk. Do, ne forgesu aliĝi dum tempo, kiam validas la plej bonaj partoprenkotizoj. Ne nur pri tio, sed ankaŭ pri aliaj aranĝoj kaj novaĵoj vi legos en tiu ĉi numero. Do, agrablan legadon!

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-Retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko de la naturo!



**Redaktoro Miroslav Hruška**

## **2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO**

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas [ĉi tie](#).

Arkivo de Retkomunikoj troveblas [ĉi tie](#).

### 3. ALIĜPERIODO POR ĈEA-KONFERENCO EN NYMBURK (25.-28.10.) ESTAS LA 15-A DE SEPTEMBRO!

Ni elkore invitas vin al la ĉiujara pinta aranĝo de ĈEA, ĉi-foje okazanta 45km oriente de la ĉefurbo.

Loĝado en 2litaj ĉambroj, studenthejmo kaj konferencejo estos kadre de unu konstruaĵo, proksima al la trajna kaj busa stacidomoj. Venu por renkonti geamikojn, malkovri novajn lokojn kaj amuziĝi, sed ankaŭ por ion novan kaj utilan lerni, diskuti kaj konkretigi kaj evoluigi nian pluan kunagadon! Krom necesa labora traktado atendas vin urbotrarigardo, ekskursoj al la kastelo Loučeň aŭ al la banloko Poděbrady, vespero pri UKo en Rejkjaviko, dancvespero, kantado kun gitaro, filmprojekciado, diversaj labor- kaj studgrupoj kaj konversacia rondeto. Rabatita "pakaĵo" por 3 tranoktoj + kompletaj manĝoj estas 1.350 CZK. Eblas mendi ankaŭ nur unuopajn servojn. En la Kalendaro de aranĝoj en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) sur tiu [ĉi paĝo](#) troviĝas ĉiuj bezonataj informoj (inkluzive detalan prezaron kaj kadran programon).




Ĉeĥlingva elektronika aliĝilo troviĝas ĉi tie: <https://docs.google.com/forms/d/16Fm9N-BAxgqiJ8yitqyzW5qjr7-pVy1YtkT9Rd356nk/viewform>, ev. uzu paperforman aliĝilon el STARTO 2013/2. Por ĝui la finance plej favoran varianton, ne forgesu aliĝi ĝis 15.9.!

Eksterlandanoj kun intereso partopreni bv. skribi al [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz)!

### 4. JUBILEA SOLENAĴO EN SVITAVY (27.-29.9.) - NE MALTRAFU ALIĜPERIODON (31.8.)!

Aranĝo omaĝe al 80jariĝo de Esperanto en Svitavy, 5-a naskiĝtago de Esperanto-Muzeo kaj Sanktvenceslaa solenaĵo proksimiĝas! Krom solenaj programeroj atendas vin interesa vojaĝprelego de Jano Vajs pri Antarkto kaj inaŭguro de lia montpinta fotoekspozicio, enurba vingustumado, projekciado kaj prelego pri impresoj el Islando, dancvespero kun tombolo, lingvokleriga seminarieto (pri vojaĝtemo) kaj precipe verŝajne la lasta okazo vidi vive unikan esperantlingvan surscenigon de la dramo R.U.R. de Karel Čapek! Por havi garantion pri tranokto (pro la urba solenaĵo) por 1 aŭ 2 noktoj en studenthejmo (200,- CZK ponokte) gravas aliĝi kaj antaŭpagi ĝis 31.8.! Programkotizo 100,-CZK (por membroj de ĈEA, ĈEJ, SKEF kaj SKEA) aŭ 150,-CZK (por ĉiuj ceteraj). Bv. aliĝi ĉe [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz), **Kontonumero por pagoj:** 2200199009/2010 + variebla simbolo el via naskiĝdato (ekz. 21.5.1968=21051968).

Pli detalajn informojn vidu [ĉi tie](#).



## 5. 7-A POSTFERIA RENKONTIĜO EN SUDA BOHEMIO

La 7-A POSTFERIA RENKONTIĜO EN SUDA BOHEMIO okazos la 7-an de septembro, ĉi-foje en Vodňany kadre de la Urba Solenaĵo de Vaporo. Alveno de la vaportrajno, historia pro cesio, kultura programo surplace, trarigardo de la urbocentro (kun Esperanto-ĉiĉeronado), komuna tagmanĝo kun lingvokleriga programeto, vizito de la Urba Muzeo kaj Galerio, Esperanto-konversacio en sukeraĵejo aŭ dumpromene preter la fiŝlagoj. Kotizo por tagmanĝo (ĉefplado, eblas ankaŭ senvianda) + organizaj elspezoj 80,- CZK (pensiuloj, studentoj, senlaboruloj) aŭ 100,- CZK (laboruloj) pagotas surloke. Partopreno en la programo senpagas. Aliĝkontakto: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz). Renkontiĝo inter 9:00 kaj 9:15, preciza loko estos konfirmata al la aliĝintoj. Por havi garantion pri tagmanĝo, bv. anonci vin ĝis 4.9.!



Centro de Vodňany

## 6. SKOLTA SOLENAĴO EN KOPŘIVNICE (12.-13.9.)

Kadre de la solenaĵo 12.9. je la 17-a horo okazos inaŭguro de la migra ekspozicio "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" en "Muzeum Fojtství" (Záhumní 1) kaj 13.9. samhore post inaŭguro de la savita Esperanto-monumento okazos prelego/diskuto kun projekciado pri Esperanto en areo de Skolta Centro Vanaivan (Komenského 1520). Partopreno de esperantistoj estas aparte bonvena! Vespere estas trajnkonekto direkte al Ostrava, Hranice kaj Přerov.



## 7. DU AŬTUNAJ ARANĜOJ POR VIA LINGVA PERFEKTIĜO!

16.-22.9. okazos en la pensio ESPERO en Bohemia Paradizo norde de Prago tradicia LINGVA SEMINARIO (info: [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz), eblas aliĝi ankaŭ por malpli da tagoj!) kaj 16.-20.10. en la kastelo

Bartošovice (sudokcidente de Ostrava) okazos la 2-a INTERNACIA ESPERANTO-LERNEJO (info: [verdastacio@gmail.com](mailto:verdastacio@gmail.com)).

Ambaŭ aranĝoj ofertas antaŭtagmezan diversgradan lingvoinstruadon, posttagmezajn ekskursojn kaj vesperajn kulturajn kaj amuzajn programojn. Pli detalajn informojn vidu en Kalendaro de aranĝoj en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz).



## 8. VORTOJ DE LA ĈEFDELEGITO

### Malhelpu al bibliotekoj forigi E-literaturon

Mi aĉetis en brokantaĵ-vendejo (antikvariát) la lernolibron "Esperanto pro samouky" fare de Věra Barandovská kaj en ĝi estis stampo "Urba biblioteko Prago - eligita". Tio signifas, ke longe neniuj prunteprenis ĝin kaj la biblioteko ĝin konsideris forĵetbla. Ni malhelpu tiun agadon de la bibliotekoj! La rimedo estas simpla: en via biblioteko elserĉu en katalogo librojn en Esperanto kaj pri Esperanto kaj sinsekve prunteprenu ilin. Eĉ se vi ne legos ilin (tamen, prefere legu!) vi helpos konservi ilin en la bibliotekoj kaj en iliaj katalogoj por la venontaj generacioj. Antaŭdankon! PCh



## 9. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

### Artikoloj en esperanto en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)

Ni invitas vin al regulaj vizitoj al <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality> kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

[Esperantigitaj filmoj pri Suda Bohemio](#)

[Muziko kaj kankano dum la Muzea nokto 2013](#)

[Mark Fettes elektita kiel nova prezidanto de UEA](#)

[Forpasis artisto Jiří Harcuba](#)

### Nur ĉeĥlingvaj artikoloj:

[Filmy ze Světového esperantského kongresu v Reykjavíku](#) (Filmoj el Universala KOngreso de Esperanto en Rejkjaviko)

[Max Kašparů v Českém rozhlasu](#) (Max Kašparů en Ĉeĥa radio)

[Nové články o esperantu nejen v českých novinách a na českém webu](#) (Novaj artikoloj pri esperanto ne nur en ĉeĥaj gazetoj kaj en ĉeĥa reto)

[Marek Blahuš v ČT2](#) (Marek Blahuš en Ĉeĥa televido 2)

## 10. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY

[Juna Sherlock](#) - malnova komedio kun Esperanto-subtekstoj

[Somera Esperanto-Studado en Martin 2013](#)



**Muzikaj registraĵoj:**

[Vera kankano en Esperanto-muzeo!](#)

[Tango de la Amo](#)

["If I Had a Hammer" en Esperanto](#) (origine en la preperuaro de Peter, Paul and Mary, al ĉeĥoj konata en traduko "Kladivo" kantita de Waldemar Matuška)

[Asorti - Rideto de l' Somero](#) - kanto de la litova muzikgrupo el la KD-albumo "Lernejoj Amikoj"

[Vinberejoj, vinberejoj - moravia popolkanto](#) - en prezento de Miroslav Smyčka

[JoMo - Se dancas la raben'](#) - vigla jida kanto, el koncerto dum la 86-a SAT-Kongreso, okazinta 28.7.-4.8. en Madrido

**Artikoloj**

[Komponisto Lou Harrison](#) (1917-2003)

**Novaĵoj en Fotogalerio de muzeum.esperanto.cz**

[Ekspozicio "125 jaroj de Esperanto"](#) - kompleta fotodokumentado de la ĵus finita tutjara ekspozicio

[Muzea nokto 2013](#)

[La svitava ensemblo DOMA en Islando](#) - prezento de la dramo R.U.R. dum la 98-a UKo

**11. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS**

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)



Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) partoprenas la somerajn Esperanto-aranĝojn. En Somera Esperanto-Studado en Nitra (Slovakio) el 230 ĉeestantoj estis 16 el Ĉeĥio (inter ili 5 junuloj). La UK-n en Rejkjaviko partoprenis krom Pavel BROM ankaŭ Matěj NÁROŽNÝ kun 4 amikinoj el Svitavy. La kvinopo tie prezentis la teatraĵon R.U.R. en Esperanto. Vít MIŠUREC kun patrino partoprenis la IJS-n en Tiszafüred. La malgrandan IJK-n en Nazareto partoprenis neniu ĉeĥo.

Jam komencmaje kvarpersona grupo el Brno trejniĝis pri WikiTrans en Partizánske (Slovakio). Mezmaĵe Marek BLAHUŠ kun Peter BALÁŽ invitiĝis al Germana Esperanto-Kongreso en Nürnberg. Tiuj du ankaŭ partoprenas la EU-projektojn Deutsch.info kaj Lingvo.info, kunordigatajn de esperantistoj, kies kunvenoj okazis siavice mezjunie en Berlin kaj komencjulie en Poznań. La 20-an de junio Marek festis 10-jariĝon de sia esperantisteco. Maĵe li vizitis Jiří GALUŠKA, kiu staĝas ĉe EU en Bruselo, komencjunie gastis en Poznań kaj finjunie partoprenis kun sia koramikino busekskurson de AEH-IKEH al Herzberg am Harz, post kiu li gastis en Berlino kaj Hamburgo. La 26-an de julio li vive parolis pri Esperanto dum 2-foje 6 minutoj en la programo Dobré ráno de Ĉeĥa Televido (kelkdek mil spektintoj), trovebla rete ankaŭ kun Esperantaj subtekstoj ĉe <http://tinyurl.com/dobre-rano-esperanto> Komence de aŭgusto li renkontis lokan esperantiston Wélism' Di' dum la tutmonda vikipedia renkontiĝo Wikimania en Honkongo.

Miroslav HRUŠKA kadre de siaj someraj trajnvojaĝoj en Aŭstrio vizitis meze de julio la esperantistajn geedzojn Jelena kaj Otmar LIEBHART en Ellbögen apud Innsbruck kaj komence de aŭgusto renkontiĝis kun Theresia Norina SAUER en Graz.

La urbon Brno julie vizitis junaj esperantistoj Zend (Ray CHEW) el Singapuro kaj polo Jakub REBELSKI. Pragon fine de julio vizitis katalunoj Javier kaj Saioa kaj brazilaninon Luana FRANÇA tie poste gastigis Jan ŠEBETOVSÝ. Václav ZOUZALÍK komencis la 7-an de julio trimonatan staĝon en la sidejo de E@I en Partizánske. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

## 12. LISTO DE ARANĜOJ

2013-09-07: Renkontiĝo en Přerov (omaĝe al 90jariĝo de la loka klubo) Info: [tonda.krejcir@seznam.cz](mailto:tonda.krejcir@seznam.cz)

2013-09-07: La 7-a Postferia Renkontiĝo (en Vodňany kadre de la Urba solenaĵo) Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)



2013-09-16/22: Aŭtuna lingva seminario - Tradicia semajna seminario en pensiono ESPERO, kiu troviĝas en pitoreska okcidenta parto de Bohemia Paradizo (norde de Prago). Pli da informoj: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/a-tuna-lingva-seminario-624.html>

2013-09-20/22: [ARKONES - ARTaj KONfrontoj en ESperanto](#). Tradicie denove en pola urbo Poznano.

2013-09-27/29: [Jubilea solenaĵo en Svitavy](#). Bunta kultura kaj kleriga programo omaĝe al la kvina naskiĝdatreveno de Esperanto-Muzeo kaj 80 jaroj de esperanto en Svitavy.

2013-10-16/20: [La 2-a Internacia Esperanta Lernejo](#). Intensaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj (kiel instruanto partoprenos ankaŭ Stano Marček). Okazloko (tranoktado, manĝado kaj instruado): kastelo Bartošovice, 20 km sudokcidente de Ostrava, en la centro de la naturrezervejo Poodří.

2013-10-25/28: [Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio](#). Pinta aranĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun labora traktado, temaj seminarioj kaj programoj ekskursaj, kultura kaj amuza. Okazloko: Nymburk.

2013-11-08/10: 4-a BIERO en Příbram - Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo, organizas ĈEJ kaj E-mentál. Info: [pismis@volny.cz](mailto:pismis@volny.cz) kaj <http://www.e-mental.cz/archiv/2625>

2013-11-30: [Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek](#).

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al [retkomunikoj@esperanto.cz](mailto:retkomunikoj@esperanto.cz). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

ĈEA-Retkomunikoj 2013/3

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – [retkomunikoj@esperanto.cz](mailto:retkomunikoj@esperanto.cz)

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš